RAPORTO DE LA AFRIKA KOMISIONO DE UEA PRI LA 8-A AKE EN SENEGALO 2022

En varma klimato, la Lando de ***Terenga*** (gastamo), Senegalo, en la urbo Ties okazis la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto sub la temo de " Esperanto, ŝanco kaj ne minaco por Afriko". La kongreso estis kun granda sukceso, ĉar ĉeestis/partoprenis 55 Esperantistoj el 17 landoj. Partoprenis : ***Burundo, Togolando, Madagaskaro, Tanzanio, DR Kongo, Kongo Brazavilo, Belgio, Senegalo, Germanio, Rusio, Usono, Meksiko, Hispanio, Islando, Francio, Brazilo kaj Italio.***

Partoprenantoj ekalvenis ekde dimanĉo la 25an de decembro 2022, antaŭ la malfermo de la kongreso.
Lundo, la 26an de decembro 2022 estis la tago de akcepto kaj aliĝo de partoprenantoj alvenintaj el diversaj landoj de la mondo.

Ĉeestis du Reprezentantoj de UEA en la 8-a kongreso nome: S-ro Jérémie Sabiyumva estrarano de UEA kiu respondecas pri Afriko, Jean François LO JACOMO ankaux estrarano de UEA. ĉiuj membroj de la Afrika Komisiono de Esperanto cxeestis la kongreson, kaj estas la unua fojo en la historio de la movado en Afriko kunigi ĉiujn membrojn de la komisiono fizike.

Esperanto-kursoj antaŭ la kongreso

Antaŭ la kongreso, la plej grava etoso kiu unikigis la kongreson estis decidite, ke du instruistoj iros al Senegalo por instrui Esperanton al lokanoj, kunprepari la kongreson dum maksimuma daŭro de tri monatoj antaŭ la kongreso, kio ebligis lingvan pliboniĝon de lokaj Esperantistoj kaj donis naskiĝon de novaj aliaj Esperantistoj, kio ebligis facilan interkompreniĝon dum la kongresode la lingva nivelo kaj interkompreno de. S-roj Viatĉeslav Ivanov kaj Espoir Kassati Ngoma kunlaboris danke al la subteno de ILEI kaj Mireille Grosjean. La kontribuo de la menciitaj personoj kaj instancoj estis tre sukcesa kaj utila por la kongreso kaj por lokanoj.

8-a Afrika Kongreso de Esperanto
26-30 de decembro 2022
Tieso, Senegalo

S-ro Ivanov

S-ro Ngoma Kasi Espoir

Ni sukcesis rimarkinda unikecode kunigo de ĉiuj membroj de la Afrika Komisiono en unu loko por la unua fojo fizike kunsidi kaj kuntrakti la pormovadajn temojn rilate la bonan evoluon de la movado en Afriko kaj elspezi strategiojn per kiuj la Komisiono sukcesos atingi sian plejan celon: Verdigi la tutan kontinenton per kunlaboro. Ĉi tio estas io multe aprezita. Elkore ni dankas al ĉiuj, kiujn donacis por la aĉeto de tiesil flugbiletoj por Komisionanoj ĉefe (UEA, Mireille Grosjean kaj François LO JACOMO.)

Membroj de la Afrika Komisiono

En la virtuala malferma parolado, la Prezidanto de UEA s-ro Duncan Charters salutis kaj dankis la kongres-organizantojn kaj instigis ilin kunlabori kun UEA kun la celo antaŭenigi la Esperanto-lingvon kaj krei bonan rilaton kun la mondo ĉirkaŭ ni.

Pri la membro de UEA respondecanta pri Afriko S-ro Jeremie Sabiyumva, dankis la lokan organizan komitaton, kiu investis sian tutan energion en la organizado de la 8-a Afrika Kongreso. Li promesis al ili sinceran kunlaboron kaj la subtenon de UEA en la promocio de la lingvo Esperanto en la tuta Senegalo.

La kunordiganto de Afrika Komisiono de UEA S-ro Manirakiza Aime Patrick dankis ankaŭ ĉiujn partoprenantojn, kiuj honoris la kongreson per sia partopreno fizika sed ankaŭ promesis al la senegalaj Esperantistoj materialan subtenon (librojn) sed ankaŭ kuraĝigis ilin plifortigi la Edukan kampon, kiu estas la motoro en la progreso de la lingvo Esperanto.

Li petis ilin flankenmeti iliajn diferencojn kaj kunlabori kiel gefratece por allogi la neesperantistan komunumon aliĝi al lernado de la lingvo Esperanton. Li ankaŭ petis ilin multobligi la klubojn en multaj lokoj de Senegalo por ke la Esperanto-lingvo estu parolata de multaj homoj kaj ĝia instruado estu akurata.

La aliaj prelegantoj, nome la prezidanto de la Senegala Esperanto-Asocio "SEA", bonvenigis ĉiujn partoprenantojn kaj ankaŭ deziris al ili bonan kunrestadon dum la tuta kongresum-tempo en Tieso/Senegalo.

Kongresaj programeroj

Multaj prelegantoj partoprenis amase por honori ĉi tiun eventon per diversaj atentokaptaj, interesegaj prelegoj, prelegis: Mireille Grosjean, Francois Lo Jacomo, S-ro Jeremie Sabiyumva, Ivanov, Francesco Maurellie, Koffitche Koufionou, Mioranantenaina, Lydie, Espoir Ngoma KASATI, Rakoen, Andreas Emmerich, Hawa Diol kaj multaj aliaj. Ili multe dividis siajn spertojn per malsamaj virtualaj aŭ fizikaj prezentaĵoj.

Programeroj dum la kongreso estis riĉaj kaj interesaj. : AMO Seminario, renkontiĝoj kun loka komitato, Esperanto-klasoj, la kulturo, maskoj kaj antaŭjuĝoj pri voduoj (Afrika kulturo), virina Esperanto-movado kaj reorganizado aŭ restrukturado de loka movado.

26-30 de decembro 2022
Tieso, Senegalo

Loĝado

La du centroj, interalie Toastan-Centro kaj Senghor Hotelo, estis tre utilaj ĉar Toastan-Centro konsentis gastigi partoprenantojn venantajn de ekster Senegalo kaj Senghor Hotelo gastigis la lokanojn.

Manĝadoj

La nura problemo ĉi tie kiu okazis estis la manĝaĵo por lokanoj. La kosto de manĝaĵo en tostan-centro estis tre alta, kio devis la Afrikan Komisionon serĉi apude ekster la Tostan-Centro sekuran kaj puran lokon kiu povis disponigi manĝaĵon por lokanoj. La Komisiono trovis taŭgan lokon, kiu nutrigi ĝissate ĉiujn lokajn Esperantstojn bonkoste.

La Ekskurso kaj Futbala matĉo

Partoprenantoj ĝuis la nokton de nacia vespero, kie la organiza komitato invitis tradician danc-teamon nomitan Griot varmigi per dancoj kaj kantoj ĉiujn kongresanojn, la etoso estis certe pleja.

Ekskursoj

La ekskursoj en diversaj vizitindegaj lokoj estis riĉa. Ĉi tie ni povas mencii la viziton al Roza Lago, la vojaĝon en la jupoj de la kolonianoj en la dezerto, kaj ĉe la mara strando de la Atlantika Oceano.

26-30 de decembro 2022
Tieso, Senegalo

La vizito al la insulo Goreo estis eksterordinare tikla, ĉar oni povis observi kaj legi pri la historio de Afriko rilate la Triangulan Komercon. La vizito ĉe la sklav-domo, kie Nigruloj estis malliberigitaj atendante deportadon ekster Afrikon. La vizito vekis bedaŭron, kaj nebrideblan larmo-elfluon ĉe kelkaj ekskursintoj!

La domo kie Blaise Diagne naskiĝis

Antaŭ la fermo de la kongreso okazis futbala matĉo inter la Esperanto-teamo kontraŭ loka teamo. Bedaŭrinde la loka teamo gajnis per tri goloj kontraŭ la Esperanto-teamo..

Esperanto teamo

Libroj estis disdonitaj al Esperanto-instruistoj por plifortigi la movadon en kluboj instrukampe.

Post fortaj interparoloj kun membroj de la Senegala Esperanto-Asocio kaj membroj de la Afrika komisiono por cele la:

- Plifortigon de la E-movado en Senegalo,
- Revigligon de la Junulara movado kaj registri ĝin kiel jure konatan establon en Senegalo kaj poste pakti ĝin al TEJO;
- Plifortigi la Senegala virina movado
- kaj la multobligo de Esperanto-kluboj rilate instruadon. Ĉi tie ni petis ilin esti en sincera kunlaboro kun ILEI.

- Strukturon de unua virina movado en Senegalo, kiu ĵuse naskiĝis dum la 8a kongreso,

8-a Afrika Kongreso de Esperanto
26-30 de decembro 2022
Tieso, Senegalo

Kongresa rezolucio

De la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 okazis en Tieso, Senegalo, la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA, en kiu partoprenis geesperantistoj el 17 landoj. La kongresa temo estis: ESPERANTO, ŜANCO KAJ NE MINACO POR AFRIKO".

Post diskutoj, ni alvenas al la jena rezolucio:

1. La Afrika komisiono kuraĝigu esperantistojn verki kaj ludi esperantajn filmojn por kontribui al la esperanta literaturo
2. Pro la evantuala UK en Tanzanio, la kongresanoj petas al AK okazigi la sekvan AKE en la sama jaro de UK en Afriko, kaj ĝi okazu aŭ en la kongreslando, aŭ en najbara lando,kaj en sekva aŭ posta kongressemajno.
3. Kaze ke UK okazos en 2024 en Tanzanio, kongresanoj rekomendis al AK kuraĝigi junulojn kaj instruemulojn inviti IJK-n kaj ILEI kongreson en najbaraj landoj de UK lando.
4. Virinoj laboru man en mane, kaj kunlaboru kun Afrikaj kaj eksterafrikaj instancoj por havi fortan movadon en siaj landoj.
5. Virinoj partoprenu en ĉiuj agadoj de esperanto kaj verku esperantaĵojn, konsciante ke virinojn havas grandan rolon en la esperanto movado.
6. Senegalo estas strategia lando por atingi la najbarajn landojn, AK helpu al la enlanda movado, akompanu esperantistojn, por plifortigi la movadon.
7. La modernigo de la instruado en Afriko estas granda neceso, AK pripensu kiel ekinstrui Esperanton per la reto.

26-30 de decembro 2022
Tieso, Senegalo

Farita en Tieso, la 30-an de Decembro 2022

La kongresanoj.